

Gazetarkomunikajo

Strasburgo, la 23an de septembro 2010

Okaze de la « Eŭropa tago de lingvoj » la 26an de septembro, Eŭropo Demokratio Esperanto alprenas starpunkton pri la propono de la komisiano Barnier ^[1], respondeca pri la interna merkato kaj servoj. Lia propono rilatas kun starigo de nova lingva reĝimo kadre de estigo de tuteŭropa komunuma patento. Ni memoru, ke la komunuma patento, kiu hodiaŭ estas nur projekto celas liveradon de ununura patento por ĉiuj 27 membroŝtatoj de EU.

Hodiaŭ, « eŭropa patento », kies petproceduron regas la Konvencio pri Eŭropa Patento (KEP), estas prizorgata de la Eŭropa Ofico pri Patentoj (EOP) ekde 1978. La eŭropa patento ebligas per unika kaj centra proceduro liveri dokumenton potenciale validan hodiaŭ en 37 landoj, kies tiuj de EU. Post tiu paŝo, estas necese validigi ĝin en ĉiu lando kie oni deziras protektadon, kio estigas tradukkostojn en iuj landoj.

Kadre de la komunuma patento, Eŭropo Demokratio Esperanto (EDE)

-komprenas la neceson malpliigi la kostojn de tiu estonta komunuma patento.

-aprobos la eblon kadre de registro de patento, kies elpensinto ne havas unu EOP-laborlingvon kiel gepatran lingvon, **esti repagita tiom, kiom kostis la tradukado en la anglan, francan aŭ germanan.**

-deklaras sin skeptika pri uzado de aŭtomata tradukado de jure valida lingva versio por informi en sia gepatra lingvo civitanojn pri enhavo de patento

-notis, ke en la nuna propono, **plia traduko** en lingvon ne estantan unu el la 3 EOP-laborlingvoj povos esti postulata **nur kaze de konflikto** ligita kun aparta kontestata patento

EDE ankaŭ deziras sciigi pri sia analizo kaj esprimi kelkajn rekomendojn.

Koncerne la eŭropan patenton, la interkonsento de Londono ekaplikiĝis la 1an de majo 2008 en 14 ŝtatoj partoprenantaj en la KEP, kiuj akceptis rezigni tute aŭ parte pri tradukpostuloj. 17 membroŝtatoj de EU tamen ne jesis al la interkonsento de Londono kaj postulas, ke la tuton de eŭropa patento oni traduku en sian oficialan lingvon.

EDE rekonas la sisteman tradukadon de patentoj kiel rimedon provizi la oficialajn lingvojn de Eŭropa Unio per vorttrezoro propra al ĉiu el ili, kiu protektas ilian kapablon priskribi la plej ĝisdatan sciaron. EDE rekomendas en la estonta reĝimo de la komunuma patento konservadon laŭ nova formo de tiuj bonefikaĵoj. Sekve por garantii la esprimkapablon de aliaj lingvoj de EU sur la scienca, teknika kaj teknologia kampoj, kompanse al tiu eblo, ke nur unu lingva patentversio en unu el la tri EOP-laborlingvoj jure validu, **EDE petas, se ne estas plena patenttraduko, eltrovon kaj publikigadon de novaj terminoj kaj radikoj koncernitaj en la diversaj naciaj lingvoj.**

Por pligravigi ĉiujn oficialajn EU-lingvojn, **EDE vigle alvokas starigi la eblecon, ke patenta versio en la gepatra lingvo de la registranto ankaŭ konsistigu jure validan version**, por la koncerna patento same kiel la tri versioj en la EOP-laborlingvoj.

Eĉ se nuntempe ankoraŭ 48% el la patentoj estas plu registrataj ĉe EOP en la germana kaj la franca, **EDE maltrankvilas pri tio, ke laŭlonge de la pasantaj jaroj, vole aŭ nevole, la ununura angla fariĝu lingvo por registro kaj publikigo de patento.** La nova sistemo proponita ne estas ideala, sed iam fari el la angla la sola jure valida lingvo koncerne patentojn kaj pli ĝenerale koncerne justicon, politikon kaj sciencojn misformus konkurencon kaj aliron al informoj inter denaskaj anglalingvanoj kaj la cetero de la eŭropa enloĝantaro. Aldoniĝus pli ĝenerale konflikto inter interesoj de la anglosaksa mondo, inkluzive de tiuj de Usono, kaj tiuj de ĉiuj eŭropanoj. Privilegio nacias lingvon kontraŭ ĉiuj aliaj estus tiel insulta al la spirito de la eŭropa konstruado kiel al la devizo de la Unio.

Ni antaŭgardu nin kontraŭ tia mispaŝo, kiu kontraŭas al interesoj de Eŭropanoj. Ĉiuj lingvoj estas egalaj. Tial **EDE vigle alvokas, ke longperspektive oni konsideru sur la kampo de patento sed ne nur, uzadon de lingvo sendependa de iu ekonomia potenco. Internacia lingvo tia, kia estas esperanto** metas ĉiujn geeŭropanojn sur egalrajtan pozicion, tiel el la lernada vidpunkto, kiel el la uzada vidpunkto. Tio garantius justan kaj senpartian aliron al informoj kaj al industria propraĵo. La rekomendaĵoj ĉi-supre vortigitaj koncerne garantiadon de esprimkapablo de naciaj lingvoj ankaŭ aplikiĝu. La gepatra lingvo de la patentregistrinto samkiel esperanto estu tiam jure validaj.

Fabien TSCHUDY, sekretario de la federacio EDE

EOP: eŭropa ofico pri patentoj

[1] Komunikado IP/10/870 de la 1a de julio 2010

KONTAKEBLO POR GAZETARO

Fabien TSCHUDY, sekretario de la federacio Eŭropo Demokratio Esperanto

00 33 (0) 6 87 20 67 31 / fabien.tschudy@gmail.com